# Tutlanda Esperanto-kongreso en Rumanio
# Gherla 2022

Esperanto-Asocio de Rumanio organizas, unufoje ĉiujn tri jarojn, landan kongreson.
La lasta okazis inter la 28-a kaj 30-a de oktobro 2022, en la urbo Gherla, centre de la lando, pli facile atingebla, kie estas du aktivuloj, Mariana Berariu kaj Adrian Mărginean, entuziasmaj kaj spertaj organizantoj.

La unua duontago de la aranĝo estis dediĉita *al kunordigo***:** okazis kongreso, dum kiu ni elektis novan estraron, kiu konsistas el:

d-ino Mariana Pitar - prezidanto, kunordigo, universitata agado
Aurora Bute - internaciaj rilatoj
Mihai Trifoi - instruado, rilatoj kun ILEI
Petronela Birta - financoj
Cătălin Văduva.- virtuala komunikado.

Ni elektis s-ron Emil Crâncău kiel honoran membron de nia asocio, pro sia dumlonga kaj fervora E-agado. Li, siavice, bonvenigis la novan prezidantinon, per torto kun la verda stelo.

Okazis *ekspozicio* kun libroj kaj revuoj kaj ankaŭ *libroservo*.

Dum la *Esperanta agado-duontago* ni prezentis nian agadon por aŭ per Esperanto:

- Aurora Bute prezentas la tiujaran UK-on, por ke la samlandanoj, kiuj ne povis partopreni la universalan eventon, konu ĝin kaj eksciu pri la plej gravaj programeroj. Ĉijare, certe, temis pri *La Montreala UK*;
- Mihai Trifoi, kiel estro de la rumana ILEI-sekcio, prezentis novaĵojn kaj organizajn aferojn pri ILEI;
- Tre grava evento estis la lanĉo de la dumlonge atendita vortaro rumana-Esperanto, kunordigita de Mariana Pitar kaj Florica Popa. Ili evidentigis la malfacilaĵojn de tiu-ĉi laborado kaj dankis al la aŭtoroj pri iliaj kontribuoj;
- Doina Popa, kiu partoprenas kutime la UK-internacian koruson, partoprenis la *Internacian Tagon de Paco en Toloso* kaj dividis kun ni sian ĝojon kanti en Esperanto por paco inter rujnoj de la historia hispana urbo;
- Ne mankis E-kurso, gvidita de Mihai Trifoi.

Vespere okazis *art-kultura muzaiko***,** dum kiu la junuloj ĉefe rolis: Petronela Birta deklamis poeziojn rumanajn tradukitajn en Esperanton, ŝia filo, Marko, legis anekdotojn, kaj Adriana Dolca, Mihaela Dolca, Petronela Birta kaj Adrian Mărginean prezentis amuzan teatraĵon.

Sekvis *Kleriga duontago*, kun interesaj prelegoj:

- *Edukado por paco* - Mihai Trifoi

- *Imago de Rumanio tra francaj vojaĝantoj* - Mariana Berariu
- *Ĉina filozofio pri jino-jango kaj la kvin  elementoj* - Mariana Pitar
- *La inteligenteco dum la moderna epoko* - Adriana Dolca
- *Quo vadis niaj vestaĵoj?* - Mihaela Dolca

Ĉio finiĝis per konversacia rondo.

Krom niaj 24 rumanaj esperantistoj partoprenis ankaŭ hungaraj E-amikoj, inter kiuj Istvan Szabolcs, A-komitatano de Hungario kaj membro de EEU.

Ni pasigis tri tagojn kun bunta programo, en vere esperantista etoso!